

世界语读物选

第三册

白 松 编

北京市世界语协会 审定

知 识 出 版 社



科工委字802 2 00805405

世界语读物选 Esperantaj Legaĵoj Elektitaj

(III)

第三册


GF/04/32

白 松 编

北京市世界语协会审定

Kompilita de Baj Song

Polurita de la Pekina Esperanto-Asocio



知识出版社

1985 北 京

内 容 提 要

为了满足已经学习过世界语初级课程读者的需要，我们编辑了这本《世界语读物选》，全书共分上下中三册，撰各国世界语作品150多篇。内容丰富，题材多样，具有浓厚的趣味性和知识性。

全书由谚语、故事、轶事、寓言、对话、讲演、诗歌、书信、小说、戏剧等部分组成。第三册所收的是世界语经典著作，是进一步提高世界语水平、研究世界语的必读材料。

世界语读物选 (第三册)

白 松 编

知识出版社出版

(北京安定门外外馆东街甲1号)

新华书店北京发行所发行

北京通县长城印刷厂印刷

开本：787×1092 1/32 印张：4.75 字数：146千字

1986年2月第1版 1986年2月第1次印刷

印数：0001—6,000册 书号：9214·40 定价：1.05元

前 言

据统计，我国近几年来已有二十万人学习世界语。他们大多数学了世界语初级课程，急需继续学习和提高，但不少人由于缺乏合适的阅读材料而中断学习。为了满足他们的要求，我们编辑了这本《世界语读物选》。

全书分上中下三册，共选入各国世界语作品150多篇，其中有世界语大师柴门霍夫、尤里·巴基、卡贝等人的部分优秀作品。这本书的内容丰富，题材多样，文字优美，表现法新颖，具有浓厚的趣味性和多方面的知识性。

全书由谚语、故事、轶事、寓言、对话、讲演、诗歌、书信、科技知识、小说、戏剧等部分组成。内容由浅入深，并加了必要的注释。第一册所收的是短小易懂的作品，适合具有初级班水平者阅读；第二册所收的是优秀的中篇作品，适合具有中级班水平者阅读；第三册所收的是世界语经典著作，是进一步提高世界语水平、研究世界语的必读材料。

由于时间仓促，水平有限，难免有不妥之处，敬请读者指正。

编 者

1985年11月

ENHAVO

La novaj vestoj de la reĝo	1
Fratinoj	7
Familio	19
Maksim Maksimiĉ	25
Falĉistoj	37
Ĉu li venas	44
La faraono (fragmento)	53
Kancero de animo	68
La virineto de maro	92
Topaze (unu el la scenoj de la dramo)	117

La Novaj Vestoj de la Reĝo

de ANDERSEN

ANTAŬ multaj¹ jaroj vivis unu² reĝo, kiu tiel amis belajn novajn vestojn, ke li elspezadis sian tutan monon, por nur esti ĉiam bele ornamita. Li ne zorgadis pri siaj soldatoj, nek pri teatro kaj ĉaso, esceptinte nur se ili donadis al li okazon montri siajn novajn vestojn. Por ĉiu horo de la tago li havis apartan surtuton, kaj kiel pri ĉiu alia reĝo oni ordinare diras: "Li estas en la konsilanejo", oni tie ĉi ĉiam diradis: "La reĝo estas en la vestejo".

En la granda urbo, en kiu li loĝis, estis tre gaje; ĉiun tagon tien venadis multaj fremduloj. Unu tagon venis ankaŭ du trompantoj, kiuj diris, ke ili estas teksistoj kaj teksas la plej belan ŝtofon, kiun oni nur povas al si prezenti; ke ne sole la koloroj kaj desegnoj de tiu ĉi ŝtofo estas eksterordinare belaj, sed la vestoj, kiujn oni preparas el tiu ĉi ŝtofo, havas la mirindan econ, ke al ĉiu, kiu ne taŭgas por sia ofico aŭ estas tro malsaga, ili restas nevideblaj.

"Tio ĉi estas ja bonegaj vestoj!" pensis la reĝo; "havante tian surtuton, mi ja povus sciigi, kiu en mia regno ne taŭgas por la ofico, kiun li havas; mi povus diferencigi la saĝajn de la malsaĝaj! Jes, la ŝtofo devas tuj esti teksita por mi!" Kaj li donis al la³ ambaŭ trompantoj grandan sumon da mono antaŭe, por ke ili komencu sian laboron.

Ili starigis du teksilojn, faris mienojn kvazaŭ ili laboras,

sed havis nenion sur la teksiloj. Tamen en la postuloj ili estis tre fervoraj kaj postuladis la plej delikatan silkon kaj la plej bonan oron. Tion ĉi ili metadis en siajn proprajn poŝojn kaj laboradis super la malplenaj teksiloj, kaj eĉ ĝis profunda nokto.

“Mi volus scii, kiom de la ŝtofo ili jam pretigis!” ekpensis la reĝo, sed kaptis lin kelka timo ĉe la penso, ke tiu, kiu estas malsaĝa aŭ ne bone taŭgas por sia ofico, ne povas vidi la ŝtofon. Li estis kvankam konvinkita, ke li pro si ne devas timi, tamen li preferis antaŭe sendi alian personon, por vidi, kiel la afero staras. Ĉiuj homoj en la tuta urbo sciis, kian mirindan forton la ŝtofo havas, kaj ĉiu kun senpacienco jam volis vidi, kiel malsaĝa lia najbaro estas.

“Mi sendos al la teksistoj mian maljunan honestan ministron!” pensis la reĝo, “li la plej bone vidos, kiel la ŝtofo elrigardas⁴, ĉar li estas homo saĝa kaj neniu pli bone taŭgas por sia ofico, ol li!”

Tiel la maljuna bonkora ministro iris en la salonon, en kiu la⁵ ambaŭ trompantoj sidis antaŭ la malplenaj teksiloj kaj laboris. “Dio, helpu al mi!” ekpensis la maljuna ministro, larĝe malfermante la okulojn, “mi nenion povas vidi!” Sed li tion ĉi ne eldiris.

La⁵ ambaŭ trompantoj petis lin alveni pli proksime kaj demandis, ĉu ĝi ne estas bela desegno kaj belegaj koloroj. Ĉe tio ĉi ili montris la malplenan teksilon, kaj la malfeliĉa ministro uzis ĉiujn fortojn por malfermi bone la okulojn, sed li nenion povis vidi, ĉar nenio estis.

“Mia Dio!” li pensis, “ĉu mi estas malsaĝa? tion ĉi mi neniam supozis kaj tion ĉi neniu devas sciiĝi! Ĉu mi ne taŭgas por mia ofico? Ne, neniel mi povas rakonti, ke mi ne vidas la teksaĵon!”

“Nu, vi ja nenion diras!” rimarkis unu el la teksantoj.

“Ho, ĝi estas bonega, tre ĉarma!” diris la maljuna ministro kaj rigardis tra siaj okulvitroj. “Tiu ĉi desegno kaj tiuj ĉi koloroj! Jes, mi raportos al la reĝo, ke ĝi tre al mi plaĉas!”

“Tre agrable al ni!” diris la⁵ ambaŭ teksistoj kaj nomis la kolorojn kaj komprenigis la neordinaran desegnon. La maljuna ministro atente aŭskultis, por povi diri tion saman, kiam li revenos al la reĝo; kaj tiel li ankaŭ faris.

Nun la trompantoj postulis pli da mono, pli da silko kaj oro, kion ili ĉiam ankoraŭ bezonis por la teksaĵo. Ili ĉion metis en sian propran poŝon, en la teksilon ne venis eĉ unu fadenino, sed ili, kiel antaŭe, daŭrigadis labori⁶ super la malplenaj teksiloj.

La reĝo baldaŭ denove sendis alian bonkoran oficiston, por revidi, kiel iras la teksado kaj ĉu la ŝtofo baldaŭ estos preta. Estis kun li tiel same, kiel kun la ministro: li rigardadis kaj rigardadis, sed ĉar krom la malplena teksilo nenio estis, tial li ankaŭ nenion povis vidi.

“Ne vere, ĝi estas bela peco da ŝtofo?” diris la trompantoj kaj montris kaj klarigis la belan desegnon, kiu tute ne ekzistis.

“Malsaĝa mi ja ne estas!” pensis la sinjoro, “tial sekve mi ne taŭgas por mia bona ofico. Tio ĉi estas stranga, sed almenaŭ oni ne devas tion ĉi lasi rimarki⁷!” Tial li laŭdis la ŝtofon, kiun li ne vidis, kaj certigis ilin pri sia ĝojo pro la belaj koloroj kaj la bonega desegno. “Jes, ĝi estas rava!” li diris al la reĝo.

Ĉiuj homoj en la urbo parolis nur pri la belega ŝtofo.

Nun la reĝo mem volis ĝin vidi, dum ĝi estas ankoraŭ sur la teksiloj. Kun tuta amaso da elektitaj homoj, inter kiuj sin trovis ankaŭ la⁵ ambaŭ maljunaj honestaj oficistoj, kiuj estis tie antaŭe, li iris al la ruzaj trompantoj, kiuj nun teksis per ĉiuj fortoj, sed sen fadenoj.

“Nu, ĉu tio ĉi ne estas efektive belega?” diris ambaŭ honestaj oficistoj. “Via Reĝa Moŝto nur admiru, kia desegno, kiaj koloroj!” kaj ĉe tio ĉi ili montris sur la malplenan teksilon, ĉar ili pensis, ke la aliaj kredeble vidas la ŝtofon.

“Kio tio ĉi estas!” pensis la reĝo, “mi ja nenion vidas! Tio ĉi estas ja terura! Ĉu mi estas malsaĝa? ĉu mi ne taŭgas kiel reĝo? tio ĉi estus la plej terura, kio povus al mi okazi.” “Ho,

ĝi estas tre bela,” diris tiam la reĝo laŭte, “ĝi havas mian plej altan aprobon!” Kaj li balancis kontente la kapon kaj observadis la malplenan teksilon; li ne volis konfesi, ke li nenion vidas. La tuta sekvantaro, kiun li havis kun si, rigardadis kaj rigardadis, sed nenion pli rimarkis, ol ĉiuj aliaj; tamen ili ĉiam ripetadis post la reĝo: “Ho, ĝi ja estas tre bela!” Kaj ili konsilis al li porti tiujn ĉi belegajn vestojn el tiu ĉi belega materialo la unuan fojon ĉe la solena irado, kiu estis atendata. “Rava, belega, mirinda!” ripetadis ĉiuj unu post la⁸ alia kaj ĉiuj estis tre ĝojaj. La reĝo donacis al la ambaŭ trompantoj kavaliran krucon kaj la titolon de sekretaj teksistoj de la kortego.

La tutan nokton antaŭ la tago de la parado la trompantoj pasigis maldorme kaj ekbruligis pli ol dek ses⁹ kandelojn. Ĉiuj povis vidi, kiel okupitaj ili estis je la pretigado de la novaj vestoj de la reĝo. Ili faris mienon, kvazaŭ ili prenas la ŝtofon de la teksiloj, tranĉadis per grandaj tondiloj en la aero, kudradis per kudriloj sen fadenoj kaj fine diris: “Nun la vestoj estas pretaj!”

La reĝo mem venis al ili kun siaj plej eminentaj korteganoj, kaj ambaŭ trompantoj levis unu manon supren, kvazaŭ ili ion tenus, kaj diris: “Vidu, jen estas la pantalono! jen estas la surtuto! jen la mantelo! kaj tiel plu. Ĝi estas tiel malpeza, kiel araneaĵo! oni povus pensi, ke oni nenion portas sur la korpo, sed tio ĉi estas ja la plej grava eco!”

“Jes!” diris ĉiuj korteganoj, sed nenion povis vidi, ĉar nenio estis.

“Via Reĝa Moŝto nun volu plej afable demeti viajn plej altajn vestojn,” diris la trompantoj, “kaj ni al Via Reĝa Moŝto tie ĉi antaŭ la spegulo vestos la novajn.”

La reĝo demetis siajn vestojn, kaj la trompantoj faris, kvazaŭ ili vestas al li ĉiun pecon de la novaj vestoj, kiuj kvazaŭ estis pretigitaj; kaj ili prenis lin per la kokso kaj faris kvazaŭ ili ion alligas. — tio ĉi devis esti la trenaĵo de la vesto — kaj la reĝo sin turnadis kaj returnadis antaŭ la spegulo.

“Kiel belege ili elrigardas¹⁰, kiel bonege ili sidas!” ĉiuj

kriis. “Kia desegno, kiaj koloroj! ĝi estas vesto de granda indoo!”

“Sur la strato oni staras kun la baldakeno, kiun oni portas super Via Reĝa Moŝto en la parada irado!”¹¹ raportis la ĉefa ceremoniestro.

“Nu, mi estas en ordo!” diris la reĝo. “Ĉu ĝi ne bone sidas?” Kaj ankoraŭ unu fojon li turnis sin antaŭ la spegulo, ĉar li volis montri, ke li kvazaŭ bone observas sian ornamon.

La ĉambelanoj, kiuj devis porti la trenadon de la vesto, el-tiris¹² siajn manojn al la planko, kvazaŭ ili levas la trenadon. Ili iris kaj tenis la manojn eltirite¹³ en la aero; ili ne devis lasi rimarki¹⁴, ke ili nenion vidas. Tiel la reĝo iris en parada marŝo sub la belega baldakeno, kaj ĉiuj homoj sur la stratoj kaj en la fenestroj kriis: “Ho, ĉielo, kiel senkomparaj estas la novaj vestoj de la reĝo! Kian belegan trenadon li havas al la surtuto! kiel bonege ĉio sidas!” Neniu volis lasi rimarki, ke li nenion vidas, ĉar alie li ja ne taŭgus por sia ofico aŭ estus terure malsaga. Nenia el la vestoj de la reĝo ĝis nun havis tian sukceson.

“Sed li ja estas tute ne vestita!” subite ekkriis unu malgranda infano. “Ho ĉielo, aŭdu la voĉon de la senkulpeco!” diris la patro; kaj unu al la¹⁵ alia murmuretis, kion la infano diris.

“Li estas tute ne vestita; tie staras malgranda infano, kiu diras, ke li tute ne estas vestita! Li ja tute ne estas vestita!” kriis fine la tuta popolo. Tio ĉi pikis la reĝon, ĉar al li jam mem ŝajnis, ke la popolo estas prava; sed li pensis: “Nun nenio helpas, oni devas nur kuraĝe resti ĉe sia opinio!” Li prenis teniĝon ankoraŭ pli fieran, kaj la ĉambelanoj iris kaj portis la trenadon, kiu tute ne ekzistis.

Esperantigis **L.L. ZAMENHOF**

1. L.R. (Lingvaj Respondoj), p. 72, lasta paragrafo: “Estas diferenco inter *multaj homoj* kaj *multe da homoj*: *multaj homoj* =

diversaj homoj (ĉiu aparte); *multe da homoj* = granda nombro da homoj (kune).” Ĉar la signifo intencita supre estas “granda nombro da jaroj”, oni laŭ la Zamenhofa konsilo devus diri “Antaŭ multe da jaroj”.

2. Vidu noton 1 sur p. 1.

3. L.R. 54, p. 72. ‘ . . . Kvankam mi ofte uzis la formon “la ambaŭ” tamen mi opinias nun, ke pli logike estas uzi la vorton “ambaŭ sen artikolo.” Do, ĉi tie kaj aliloke forigu “la” antaŭ “ambaŭ”.

4. En moderna stilo oni ne uzas “elrigardi” en la senco bezonata ĉi tie; oni uzas “aspekti”. Do legu *aspektas* ĉi tie.

5. Forigu *la*.

6. L.R. 49, p. 43. “Daŭri” = esti plue, ne esti finita. . . . Oni povas diri “la laboro daŭras” (la laboro estas plue, ne estas finita), sed oni ne povas diri “mi daŭras labori” (mi estas plue labori! mi ne estas finita labori!); ankaŭ ne estas bone diri (kiel mi mem bedaŭrinde faris kelkfoje) “mi daŭrigas labori” (mi igas esti plue labori!); oni devas diri “mi daŭrigas mian laboron” (mi igas mian laboron esti plue), aŭ “mi laboras plue.” Do ĉi tie legu *daŭrigadis sian laboron*.

7. Vidu noton 3 sur p. . Legu *oni devas ne lasi iun ĉi tion rimarki*.

8. “Unu post la alia” komprenigas, ke troviĝas nur *du* personoj aŭ objektoj. Ĉi tie troviĝas multe da personoj, do forigu “la” kaj legu *unu post alia*.

9. Ĉe nombroj, kiuj indikas adicon, oni apartigu la elementojn: $16 = 10 + 6$; oni do skribu *dek ses*. (Ĉe nombroj, kiuj indikas multiplikon, oni kunmetu la elementojn: $60 = 6 \times 10$; oni do skribu *sesdek*.)

10. Legu *aspektas*.

11. Oni nuntempe dirus *procesio*, anstataŭ uzi ĉi tiun priskriban esprimon.

12. Oni nuntempe dirus *etendis*.

13. Legu *etenditaj*.

14. Legu *ili devas ne lasi iun rimarki*, kaj *neniu volis lasi iun rimarki*.

15. Forigu “la”.

Fratinoj

de JULIO BAGHY

Nel penseme rigardis sian fratinon, sidantan ĉe la fortepiano kaj subite sentis kompaton al ŝi. Kiel diafane maldika ŝi estas! Kiel tipa vilaĝa instruistino ŝi montras sin en ĉiuj siaj gestoj, kutimoj, preferoj. Jen ankaŭ nun ŝi ludas melodion, kiu rememorigas pri lunatika amo, tute ne konforma al la vervo kaj gusto de la modernaj tempoj. Ŝian naturan palecon pliigas la plafona elektra lumo. Certe ŝi estas enamiĝinta. Kial ne? Jam antaŭ jaroj ŝi estus devinta edziniĝi, sed... Tiu "sed" signifis la vilaĝon mem kun ĝiaj vulgaraj dandoj, eble tro drastemaj al la revema, iom nerve malforta karaktero de ŝia fratino. Sincerdire, *Nel* mem iris for antaŭ jaroj por rifuĝi ĝuste de tiuj dandoj kaj de tiam ĉiujare tri- aŭ kvarfoje ŝi revenas viziti la forlasitan gepatran hejmon, kie ŝiaj maljuna patrino kaj fratino vivas kune en animfremda duopo. Jes, la patrino povus modeli kiel tipa vilaĝa vidvino por peniko de pentroartisto. La intimeco, kiu ŝin ligas al ŝia filino, loĝanta kun ŝi, pli similas al toleremo ol al komprenemo. Nu, jes, la patrino ankaŭ ŝin ne komprenis kaj nun ŝi rememoras pri la kvereloj, kiuj antaŭis ŝian forkuron en la urbon. Tamen nun ŝi jam konstatas, ke inter ŝi kaj la patrino ekzistas gravaj similaj trajtoj en la karaktero. La unua kaj plej grava simileco estas, ke ili ambaŭ rigardas la mondon reale: ŝi en la urbo, la patrino en la vilaĝo. Ili ambaŭ adaptiĝas al la loka atmosfero, al la regantaj kutimoj: ŝi fariĝis laŭmode urbanino, la patrino restis malnovmoda vilaĝanino. Sed ŝia fratino *Lenjo* prezentas sin inter ili kiel animfremde estaĵo. Laŭaspekte *Lenjo* estas

modpasinta, laŭ pensoj tro progresema por kompreni la hodiaŭon. Jen ŝia ĵus pretigita kostumo estas laŭ minimume dudekjara modelo, ŝia frizaĵo tro simpla por plaĉi al la junuloj, ŝiaj ŝuoj kvazaŭ sakrilegie trograndigas ŝiajn miniaturajn piedetojn, entute ŝia sinteno, parolmaniero impresas kiel knabina idealo de junuloj antaŭ kvardek jaroj. Ne, neeble! Iel ŝi devus skui tiun ĉi lunatikulinon el la revomondo kaj konduki ŝin al la realeco de la vivo. Tio estas ja ŝia fratina devo.

— Lenjo, kion vi ludas? Ĉu denove la “Lastan leteron”?

— Ne! Ion novan. Ĝia titolo estas “Arbara idilio”.

— Jen, tio karakterizas vin. Kial vi ne ludas fokstroton? Aŭ la plej laŭmodan dancmuzikon “Makak hupe”?

— Ili ne interesas min . . . Almenaŭ nun ne . . . — ŝiaj fingretoj ree elvokis sentimentajn akordojn, arpeĝojn. — Ĉu ne bele, Nel?

— Ne! Tute ne! Mortintaj melodioj, kadavroodoraj lamentadoj pri la amo, pri amdoloro, pri koraj fantaziaĵoj. Ili terure mensogas. Se la amo estus tia . . . tia anemio palpado, blinda senorientiĝo, tute certe la virinoj ĉesus naski kaj la viroj . . .

— Nel, ne estu tro vulgara.

— Ĉu tro vulgara?! Ŝajnas, ke vi ankoraŭ volas kredigi al vi, ke la infanojn alportas la cikonioj. Vi devus jam scii, ke . . . — Mi scias, kara Nel, mi scias. Antaŭ dekdu jaroj vi mem bonvolis klarigi al mi, ke tiun problemon solvis Adamo kaj Evo sen tiu klakanta birdo. KREDU, ke de tiam ankaŭ mi klopodis ĝuste orientiĝi pri la biologio.

— Dank’ al Dio! Tamen ŝajnas al mi, ke vi ne tute komprenas la vivon, tiun vivon, kiun havas surtere la piedirantoj. Kiel oni prave asertas, neniuj virino ricevas infanon tra la aero, eĉ se ŝi fariĝas doktorino de la biologio.

Lenjo subite interrompis la ludadon, turnis sin per la turnseĝo al sia fratino kaj tute gaje ekridis.

— Nel, vi eraras! Laŭ la plej novaj eksperimentoj oni

asertas, ke virino povas ricevi infanon tra la aero eĉ nekonante la . . . la . . . cikonion. Antaŭ nelonge mi legis pri tio interesan disertaĵon; infano sen amo!

Nel mem ridetis por momento, poste pli verve, pli temperamente daŭrigis.

— Aŭskultu! Ne pri infano temas. Ne! Sed pri la amo. Ĉu vi komprenas? Amo, kiu feliĉigas la junajn korojn. Eĉ ne pri tio temas. Mi volas aludi, ke la amo en ĉiu epoko havis siajn artifaĵojn, kiujn oni aplikis por plaĉi unu al alia. Ankaŭ la moderna epoko havas ruzaĵojn por vekti la aman senton.

— Mi ne komprenas vin.

— Ho, ci naivulino! Vere, ci estas vilaĝa anseridino. Por ekzemplo: ĉu vi pensas, ke via pala vizaĝeto, viaj naturaj brovoj kaj apenaŭ ruĝetaj lipoj, malnovmoda harligaĵo povus impresi viran koron en la urbo? Tute ne! Por tikli la fantazion de la vira koro ni devas sorĉi ŝminke purpuron sur la vangojn, manikure flegi la ungojn, montri pli el la kruroj kaj dekoltigi la veston incitema, elekti ŝuojn, kiuj faras optikan trompon kaj montras almenaŭ tri numerojn malpli ol efektive havas niaj piedoj. Jen! Vi aspektas kiel pupvizaĝa mezepokulino. Ĉu vi pensas, ke kun tia aspekto vi povas almiliti simpatie, intereson, amon de viro?

Lenjo tre serioze respondis.

— Jes! Mi almilitis la plej valoran koron.

Nel surpriziĝis, iom dube ridetis al ŝi.

— Mirinde! Mi scivolas jam pri via vilaĝa dando. Cetere, kiu li estas? Vi scias ja, ke mi konas ĉiujn en la vilaĝo.

— Li ne estas vilaĝa dando — kaj ŝia voĉo sonis iom ofendita. — Li estas urbano, grandurbano, eĉ metropolano. Jen! Nun vi jam scias.

— Kiam vi renkontis lin?

— Somere, kiam mi iris for en la urbon por renkonti lin, por paroli kun li, kiun mi konis de jaroj kaj kiun mi neniam vidis antaŭe.

— Tre romantike! — ironia rideto akompanis ŝiajn vortojn. — Simple vi iris kaj renkontis lin. Li tuj enamiĝis kaj fariĝis via sklavo. Ĉu?

— Ne! Li eĉ ne rimarkis min. Longe mi staris tie antaŭ li inter la lerte ŝminkitaj belulinoj, moderne, virtikle vestitaj, nur poste, kiam li rigardis al mia nepudrumita vizaĝo, al miaj naturaj brovoj kaj nenigrigitaj palpebroj, tiam li longe manpremis kun mi. En tiu manpremo enestis la mira riverenco de viro, kiu rimarkis mian senŝminkitan animon. Jes, la senŝminkitan animon mi montris al li kaj mi eĉ ne kuraĝis pensi, ke li rimarkos ĝin . . . kaj tamen, vidu, li ekamis tiun animon kaj li fariĝis mia estro kaj mi — lia sklavino.

— Tre romantike, pli ol romantike — kaj ŝi subite indigniĝis — eĉ freneze . . . Kaj kiam vi renkontiĝas unu kun la alia?

— Neniam kaj ĉiam, kiam ni volas . . . La poŝto alportas lian voĉon al mi kaj la mian al li . . . Vidu, vi, granda realistino, se mi estus sufiĉe riĉa kaj bizarema, eĉ tra la aero mi povus ricevi infanon de li.

— Ne, ne, ne! Vi ne komprenas, kio estas la amo. Vi ne povas senti la ĉirkaŭprenon de du muskolaj viraj brakoj, vi neniam povas kvietigi la kissoifon de viaj lipoj . . . Lunatikulino vi estas. Senkorpa amo! Hahaha! Ami senkorpe kaj . . .

— Senkorpa amo ne ekzistas sur la tero. Kiam vi estas for de la domo, nia patrino ame parolante pri vi samtempe vidas ankaŭ vian korpon; mi, via fratino, rememorante pri vi, vidas same, kvazaŭ vi estus inter ni kaj kiam mi pensas pri *li*, ankaŭ *li* aperas antaŭ mi tia, kia li estis dum la kune pasigitaj tagoj . . . Korpo kaj animo kune sopiras, suferas, ĝojas, vivas kaj esperas . . . Kaj tion vi nomas senkorpa amo. Ĉu? Almenaŭ tio estas tia realaĵo, kiun vi ricevas de via amanto en la urbo.

— Sence vi parolas, Lenjo. Vi devus forlasi la vilaĝon,

veni kun mi en la urbon, vidi viajn virinfratinojn, ilian vivadon kaj manĝi terpomojn anstataŭ iluzitortoj.

— Mi neniam estis scivola, Nel, *sed* nun mi demandas, kion vi ricevas pli ol mi?

La milda, humila tono de ŝia voĉo emociis ŝian fratinan koron. Nel tiris sian seĝon tute proksime al la ŝia, prenis ŝiajn manetojn, kvazaŭ sugeste rigardis al ŝiaj okuloj kaj la tono de ŝia parolo estis plena de energia decidemo.

— Lenjo, vi dormas. Vi devas vekigi. Vi demandas, kion mi ricevas en la urbo? La veron, la realaĵon! Li venas, atendas min ĉe la pordo de mia laborejo. Dum ni iras sur la strato al la kinejo mi sentas la premon de lia brako. Ni kune vespermanĝas aŭ dimanĉe ekskursas al la montoj kaj mi aŭdas lian gajan kantadon, mi vidas lian junan vivovolan amoludon, mi sentas liajn kisojn, ni kune faras planojn pri la morgaŭo. Kion mi diru? Nu, li kavalire pagas kaj agas tiel, kiel decas al tiu, kiu amindumas al amata fraŭlino. Ni kune dancas, kune promenas . . .

— Mi komprenas, Nel, sed mi scivolas, kio restas al vi, kiam li ne estas ĉe vi. Kion vi ricevas de li?

— Malsaĝaĵo! Nenio restas. Li estas for. Mi pensas, ke morgaŭ li denove venos, ni ree vizitos la kinejon. Estas bone scii, ke la proksiman tagon ripetigos ĉio, kio okazis antaŭtage.

— Bone, mi komprenas, sed diru al mi, *kion* vi ricevas de li?

— Strange, mi ne komprenas vin. Kion? Bombonojn, galanteriaĵojn, mi jam havas eĉ belan brakhorloĝeton. Jen, rigardu! Eĉ la garantian folion pri ĝi mi havas ĉe mi. Kaj, se nenio intervenos, se mi estos sufiĉe lerta, li edzinigos min. Jen!

— Nur *tion* vi ricevas. Ĉu li estas *tia* malriĉa? Kaj ion similan vi proponas al mi. Tio ne kontentigus min. Mi ricevas reĝajn donacojn de li. Tiuj donacoj almenaŭ estas tiel realaj por mi, kiel por vi la galanteriaĵoj, la brakhorloĝeto. Bone

komprene min! Kio mi estas? Eta, sensignifa instruistino en vilaĝo. Mi ne estas alloga por la vilaĝaj dandoj, ĉar por ili mi estas tro instruita, tro fraŭlina kaj tre malriĉa. Por mi ili estas tro krudvortaj, netoleremaj kaj tre riĉaj. La sola loko, kie mi renkontas veran puran senton, estas la lernejo, kie la infananimoj multe pli promesas ol poste ili donas. Pro la malespero de izoliteco mi perdis memfidon, esperon kaj iamaniere mi perdis eĉ mian diokredon. La sciencaj libroj, filozofoj, verkistoj eĉ plikomplikis la deviojn de mia vivlabirinto . . . kaj tiam venis li . . . Ho, li ne kondukis min en kinejon, nek donacis al mi galanteriaĵojn. Simple li malfermis sian koron kaj mi kuraĝis konfesi al tiu koro pri mia senespera, sencela ekzistado kaj tiam tiu ora koro ekparolis kaj inspiris vivocelon al mi, rekonsciigis mian svenintan animon, rekondukis min al la perdita Dio kaj nun mi sentas min riĉa, tia riĉa, kia neniu estas en la vilaĝo, kaj tiel feliĉa, kia vi ne estas kun viaj galanteriaĵoj . . . kaj la kisoj, karesoj de la animoj almenaŭ estas tiel sinceraj, se ne pli, ol tiuj, kiujn vi sentas reale, ĉar tiuj kisoj de la animoj ne estas efemeraj.

Paciencon perdinte Nel levigis, komencis iradi tien kaj reen en la ĉambro. Subite ŝi haltis antaŭ Lenjo.

— Kio li estas? Pastro! Ĉu? — ŝi abrupte demandis.

— Pli . . . Li estas poeto.

Neretenebla rido erupciis el Nel. Longe ŝi ne povis trovi vortojn por esprimi sian subitan indignon, ĉar ree kaj denove tiklis ŝin la komika penso “poeto kaj la vilaĝa anseridino”. Ho, tiu naiva revemulino!

— Poeto?! Hahaha! Revoluciema pugnoskuanto, malamiko de la socia ordo, revteksanto kun grumblanta stomako malplena! Hahaha! Akceptu mian gratulon. La tuta afero tre karakterizas vin.

En la okuloj de Lenjo tremis la retenataj larmoj kaj forte regante sian emociion ŝi demandis mallaŭte:

— Kaj kio estas la via?